KIO ESTAS I. S. A. E.?

Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) estas organizaĵo de esperantistoj por pli forta penetrado de Esperanto en sciencoj kaj tekniko kaj por la disvastigado de sciencaj kaj teknikaj scioj inter esperantistoj.

La *membro* de la asocio povas fariĝi ĉiu esperantisto kun la fakultata instruiteco. Sed ankaŭ aliaj esperantistoj dezirantaj subteni la celojn de la asocio povas aliĝi kiel *apogantaj membroj*. Por ambaŭ kategorioj de membroj *la jarkotizo* estas la sama: 10 steloj minimume (1 us. dol. = 15 steloj; 1 angla ŝil. = 2 st.; 1 ned. gld. = 4 st., ktp.).

Krom la pagado de la membrokotizo, ĉiu membro devas aboni Sciencan Revuon (aŭ la revuon de la faka sekcio, se tia ekzistas). La kotizojn kaj la abonojn kolektas la *landaj delegitoj* de ISAE (vidu la lastan paĝon).

La Komitato de ISAE konsistas el elektitaj komitatanoj el diversaj landoj (kun minimume 5 membroj) kaj de la reprezentantoj de la sekcioj. La Komitato skribe estas konsultata nur pri la plej gravaj problemoj de la asocio. La aktualajn problemojn decidas la *Estraro*, elektata de la Komitato. La nuna *prezidanto* de ISAE estas Prof. D-ro Y. Väisälä (Puolalanpuisto 1, TURKU, Finnlando), unu el 12 membroj de la Finnlanda Akademio de Sciencoj. La ĝenerala sekretario estas Prof. D-ro Boĵ Popović (Zagrebačka 24, SARAJEVO, Jugoslavio).

La membreco estas individua, sed la membroj el unu lando povas esti organizitaj kiel *landa filio* de ISAE. Tiaj filioj nun ekzistas en: Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Germanujo (okc.), Japanujo, Jugoslavio, Nederlando, Novzelando kaj Sovetunio.

La membroj de ISAE el unuopaj fakoj povas unuiĝi en *faka sekcio*, kiel memstara sekcio de ISAE, eĉ kiel memstara societo (kies ĉiuj membroj devus esti individuaj membroj de ISAE). En la nuna momento tiaj sekcioj estas:

arkitekt-konstruista
medicina
filologia
matematik-fizika
astronomi-geodezia.

Krom tio STELO (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo) estas *studenta sekcio* de ISAE. La membroj de STELO povas (sed nur pere de STELO) aliĝi kiel junaj individuaj membroj de ISAE (ili pagas nur *duonon* de la jarkotizo).

La sekretariejo de ISAE troviĝas ĉe la ĝenerala sekretario (prof. B. Popović, Zagrebačka 24, Sarajevo, Jugoslavio).

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 16. n-ro 1 (1965)

552.2/.3; 552.18.001.3

PRI LA KLASADO KAJ NOMENKLATURO DE LA FONOLITAJ ROKAĴOJ

J. Kavka (Ĉeĥoslovakio)

Resumo.

La traktaĵo karakterizas kaj kritikas la unuopajn sistemojn de la laŭminerala magmoroka klasado, kun speciala direktiĝo al fonolitoj. Ĝi rifuzas ĉiun aprioran skemon kaj preferas kiel eble naturan determinadon. Al la modernaj laŭkvantaj sistemoj ĝi riproĉas pro malrespekto al la intima reciproka rilataro inter la konsistigaj mineraloj. La enhavon de malhelaj konsistaĵoj ĝi faras familidetermina. Ĉi prezentas la larĝsencan difinon de fonolito kaj precizigas helpe de pluraj kvantindicoj. Samtempe ĝi aplikas simplan nomenklaturon kreitan analoge al la vulkanaĵoj saturitaj je silico.

1. Enkonduko

Dum mia plurjara esplorado direktita al la vulkanrokoj de fonolita karaktero mi renkontiĝadis kun malfacilaĵoj ĉiam, se mi volis garni per korekta nomo rokaĵon, post kiam mi estis ĝin detale priskribinta. Multnombraj petrologiaj sistemoj ja rimarkinde diferencas unu de la alia koncerne la difinon, klasadon kaj nomadon de fonolitoj. Ĉar neniu el la sistemoj estis ĝenerale akceptita fare de la tutmonda sciencistaro, oni troviĝas en embaraso, kiun elekti el inter ili.